La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-18 n-ro 389

# NASA kaj Guglo ĵus anoncis ke ili trovis alian sunsistemon kiel la nian



Instruisto spertis 16-horan dancadon partnere kun pli ol 350 virinoj

La giganta kokoskrabo sin nutras de birdoj, sciencistoj atestas

Pri GMO ankoraŭfoje

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

NASA kaj Guglo ĵus anoncis ke ili trovis alian sunsistemon kiel la nian
*Alia sunsistemo kun 8 planedoj p. 03*

Instruisto spertis 16-horan dancadon partnere kun pli ol 350 virinoj
*Brazila rekordo pri senĉesa dancado kun malsamaj kunuloj p. 04*

La giganta kokoskrabo sin nutras de birdoj, sciencistoj atestas
*Aktivaj ĉasantoj p. 05*


Pri GMO ankoraŭfoje
*Oni intencas patentigi la genan kodon de plantoj aŭ eĉ bestoj p. 06*

Hodiaŭe
*Irano p. 07*

Morfologio
*La intima realaĵo de la vortoj p. 08*

# NASA kaj Guglo ĵus anoncis ke ili trovis alian sunsistemon kiel la nian

NASA kaj Guglo anoncis "grandan malkovron" ĵaŭde [14 dec 2017]: alia sunsistemo kun 8 planedoj.



Tiun eltrovon kaŭzis malkovro de nova planedo, *Kepler-90i* – varmega, roka astro ĉirkaŭanta suno-similan stelon nome *Kepler-90*, kiu estas 2 545 lumjarojn for de la Tero.

La planedo estis trovita per la uzo maŝinlerna Gugla sistemo , kiu kribris la datumojn el Kepler-kosmoŝipo de NASA.

*Kepler*, kosma teleskopo kiu sekvas la Teron rondire ĉirkaŭ la suno, rigardis 145 000 sunsimilajn stelojn dum jaroj serĉante por signoj de malproksimaj planedoj.

Astronomoj sciis pri la sunsistemo *Kepler-90*, sed antaŭe ne malkovris tiun planedon. Ĝi aperas esti la tria planedo el la sun-simila stelo, kaj rondiras proksimume ĉiun 14 tagon. la temperaturo sur la surfaco de *Kepler-90i* estas 980 °C.

Andrew VANDERBURG, astronomo ĉe la universitato de Teksaso en Aŭstino kiu helpis trovi la planedon, diris dum gazetara informado: "Ne ŝatus mi viziti tiun *Kepler-90i*."

Christopher SHALLUE programara inĝeniero de Guglo artefarita inteligento helpis VANDERBURG en la laboro.

SHALLUE diris: "Miaopinie, kion ni elvolvis ĉi tie, estas ilo por ke la astronomoj havu pli da efiko."

VANDERBURG kaj SHALLUE ankaŭ trovis alian planedon nome *Kepler 80g*.

Por malkovri tiujn 2 novajn mondojn, Gugla maŝinlernilo lernis kiel identigi signalojn el ekstersunsistemaj planedoj registritaj en la datumoj de *Kepler*.

Ĝi procedis 14 miliardojn da datumaj punktoj el bildoj kiujn Kepler prenis dum 4 jaroj, uzante kio estas konata kiel kunfaldaĵa neŭra reto, kiu iusence imitastion kiel la homa cerbo procedas informojn.

NASA kaj Guglo diras ke tiu ĉi nova teknologio helpos sciencistojn trovi multe pli da tiaj esktersunsistemaj planedoj en la estonteco. fakte, VANDERBURG pensas ke la sunsistemo *Kepler-90* havas pli da planedoj kiujn ni ankoraŭ ne malkovris.

Li diris: "Estus preskaŭ surprize por mi se ne ekzistus pli da planedoj. Ĉu 8-planeda sunsistemo kiel nia propra sunsistemo estas tiom eksterordinara?

Eble ekzistas multaj sistemoj kun tiom multaj planedoj ke ili igas nian sunsistemon ordinara.”

Antaŭ tiu analizo, la lasta NASA ekzameno de Kepler-datumoj konfirmis 219 novajn mondojn en pli ol 4 000 kandidatoj kiujn *Kepler* trovis.

La aktualaj konfirmitaj esktersunsistemaj planedoj de la kosma agentejo nun estas 5 525 – 10 el ili eble estus rokaj, Tero-grandecaj, kaj eble enloĝeblaj por ekstertera vivo.

Al scivolemuloj kiuj volas scii ĉu artefarita inteligentecoo de Guglo sennecesigos astronomojn, NASA diris ke oni ne maltrankviliĝu.

Jessie Dotson, sciencisto de la Kepler-projekto ĉe Esplorcentro *Ames* en Silicia Valo, eksplikis ke la astronomoj ĉiam estos bezonataj por klasigi objektojn antaŭ ol sendi informojn al la neŭra reto, do tiel la artefarita inteligenteco povus lerni kiel serĉi novajn datumojn.

Dotson diris: “Ĝi [la artefarita inteligento] certege funkcios kune kun la astronomoj, vi neniam forigos tiun parton.”

Tiu ĉi artikolo originale estis eldonita de *Business Insider*.

Fonto (Angla): sciencealert.com

scienco.ir

---

# Instruisto spertis 16-horan dancadon partnere kun pli ol 350 virinoj

Iu brazila instruisto bezonis rehidratiĝon en malsanulejo post danci 16-horojn, estigante tiamaniere la brazilan rekordon pri senĉesa dancado kun malsamaj kunuloj.



Tiun faron pri salona danco plenumis Anderson Cristiano Fernandes, 35-jaraĝa, dum la pasinta semajnfino, la 9-an de decembro, en restoracio de la urbo Praja-Grando (marbordo de la subŝtato San-Paŭlo, Brazilo). Li sinsekve estis kunulo en danco al 358 malsamaj virinoj aĝantaj inter 18 kaj 90 jaroj.

De tempo al tempo la dancisto manĝetis fruktojn kun dulĉan cerealaĵon kaj trinkis akvon. “Mi spertis ordinarajn dolorojn, sed mi enfokusigis la sinjorinojn. Mi kantis ĉiujn kantojn, mi aktoris, mi instigis la spektantaron. Mi amuziĝis tuttempe!”, li diris.

Ĉeestis la okazintaĵon du juĝistoj, komisie de la organizaĵo *“RankBrasil”*, kiu registras brazilajn rekordojn. Fernandes diplomiĝis pri fizika (aŭ korpa) edukado, kaj kune kun sia edzino li mastrumas sian propran danclernejon.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# La giganta kokoskrabo sin nutras de birdoj, sciencistoj atestas

La plejmulto fakte neniam vidis la kokoskrabon de la specio *Birgus latro* [latine '*latro*' estas 'rabisto']. Ĝin malkovris Charles DARWIN, kiu elstarigis la "monstran grandon" de la nevertebrulo kiu vivas en kelkaj insuloj. La krabo ricevas la popularan nomon "kokoskrabo", ĉar ĝi facile povas grimpi kokosarbon kaj dispecigi la rigidan frukton per siaj enormaj pinĉiloj. La giganta krabo pezas ĉirkaŭ 4 kg kaj la gambo povas longi ĝis 1 metron. La kokoskraboj havas rilaton kun la ermitkraboj, kaj samgrandas kiam junaj. Malgraŭ la nomo, ĝi malofte sin nutras de kokosoj, sed oni scias ke ĝi sin nutras de aliaj plantoj. Ĝis nun.



Sciencisto Mark LAIDRE malkovris, ke kokoskraboj ne estas simplaj planto- aŭ semo- manĝantoj, sed povas fariĝi aktivaj ĉasantoj. La sciencistoj esploris tri insuletojn en Indonezio, kaj kaptis ŝokan scenon. Li observis dormantan ruĝkruran naivulon (granda marbirdo de la specio *Sula sula*) dumnokte, ripozanta ĉe arbobranĉo, kiam li rimarkis ke granda kokoskrabo alproksimiĝas malrapide. La krabo grimpis la arbon kie estis la naivulo kaj pinĉis ĝian flugilon, rompante ties oston kaj faligante la birdon. Sen ebleco eskapi, la naivulo kuŝis surgrunde dum la krabo malsupreniris kaj serĉis la alian flugilon por sekve rompi ĝin same kiel la unuan. La naivulo gratis kaj bekpikis la krabon, senrezulte. La sango elfluis el la rompitaj flugiloj, kaj ĝi altiris la atenton de aliaj kokoskraboj, kiuj avide alproksimiĝis. La kraboj batalis inter si kaj disŝiris la blekantan birdon, en sangeca spektaklo.

Ne estas la unua fojo ke oni observas tiun scenon (malgraŭ estis la unua fojo ke oni filmis ĝin). Eventuale tio povas okazi, sed la sciencisto volis scii ĉu tiu atako povas influi la konduton de la ruĝkrura naivulo. Li observadis la ĉirkaŭajn insulojn kaj provis registri kiom da nestoj estas, ĉu de ruĝkruraj naivuloj, ĉu de kokoskraboj. La rezulto estis, ke en insuloj kie troviĝas kokoskraboj simple ne estas ovoj aŭ nestoj de ruĝkruraj naivuloj. Sed en la insuloj kie ne estas la nevertebruloj, estis dekoj da nestoj kaj ties ovoj.

La rilato observita estas evidenta: la ĉeesto de kokoskraboj simple malpermesas ke la birdoj faru neston. La kokoskraboj estas la plej grandaj predantoj de tiuj insuletoj, kiuj ne distancas inter si. La birdoj certe povas iri de unu insuleto al aliaj, per malmultminuta flugado. Do, la kialo de tio ke la ruĝkruraj naivuloj ne nestas en tiu specifa insulo certe estas la voraj terkraboj.

Fonto: *Mark. E. Laidre. 2017. Ruer of the atoll. The world's largest land invertebrate. Frontiers in Ecology and the Environment 5 (9): 527-528*

Vidu la videon (vidu).

Wendel PONTES
ISAE

# Pri GMO ankoraŭfoje

Sur nia bela planedo ĉiuj homoj estas egalaj, do neniu rajtas alproprigi al si akvon aŭ nutraĵon. Sed bedaŭrinde la provo alproprigi al si nutraĵon estas la enkondukado de la Genetike Modifitaj Organismoj (GMO). Oni intencas tiamaniere patentigi la genan kodon de plantoj aŭ eĉ bestoj, por ke ili fariĝu ekskluziva posedaĵo de certaj grupoj donante al ili grandajn profitojn pro la rajto vendi ilin. Ĝis antaŭnelonge la semoj de plantoj apartenis al ĉiu, kiu ilin rikoltis sur propra kulturebla kampo, ili estis nia bono ekde la komenco de nia ekzisto.




Tamen en la lasta jarcento la artefaritaj formaĵoj, kiuj estas grandegaj konzernoj kaj korporacioj komencas forpreni de ni nian nutraĵon, kiam ili posedas la saman genan kodon, kiun ili patentigis. Kiarajte? Tia rajto ne ekzistas, sed ili ĝin altrudas al ni. Milionoj da jaroj de la evolucio de plantoj kaj bestoj kaj miloj da jaroj kiam la homoj libere ĝuis kulturi kaj bredi ilin por si, subite estas forsterkitaj de aliaj homoj dezirantaj profiti nur pro iu eta ŝanĝo de la genkodo. Tiamaniere ni povas baldaŭ senrevene esti senigitaj je tio, kion kreis por ĉiuj la saĝa Naturo.

Oni kreas tiamaniere artefaritan nutroĉenon, kiu povas alporti al la homaro katastrofajn efikojn por ĝia sano aŭ eĉ ĝia transdaŭro. Nun estas la plej urĝa tempo konsciiĝi pri la graveco de la situacio. Mi jam parolis pri toksa menuo en mia sonartikolo sub la sama titolo. Nun mi daŭrigas ĉi temon koncerne la prilaboradon de speciala leĝo en la pola Sejmo (parlamento) fare de grupeto de polaj deputitoj, kies leĝo decidos pri la nutrada suvereneco de Pollando. Jam baldaŭ montriĝos, ĉu poloj restos libera kaj sana popolo aŭ ili fariĝos sklavoj de eksterlandaj korporacioj, dependigitaj finance kaj trafitaj de malsanoj. La leĝon pri GMO skribis la oficistoj de Ministerio pri Mediprotektado.

Ĝuste ili, kaj ofte nur ili, estas la fonto de la informoj pri la temo por la deputitoj okupiĝantaj pri koncernaj leĝprincipoj. Verdire septembre [2017] okazis speciala konferenco dediĉita al la aferoj de GMO-kultivado, sed partoprenis ĝin verŝajne apenaŭ unu ano de la parlamenta komisiono. Neniu scias tamen, ĉu la ministeriaj oficistoj agis tute libere kaj honeste, des pli ke aŭdiĝas la voĉoj pri la ignorado de la opinioj de la socia flanko dum la diskutado pri la formo de la leĝo. La parlamenta grupo konsistas ĉefe el la deputitoj de la reganta partio, kaj ĝuste ĉi deputitoj ignoras la socian flankon.

La komisiono ignoras ankaŭ la konkludojn de la esplorado de GMO fare

de eminentaj polaj sciencistoj. La deputitoj unuflanke deklaras, ke ili ne deziras la kultivadon de la modifitaj plantoj, sed tuj poste pridiskutas kazojn ebligantajn la enkondukon de ĝi. Ekzemplo de tio estas notoj ebligantaj kultivi genmodifitajn plantojn en la distanco de 30 km de la plej proksima agrikultura grundo. La socia flanko de la diskutado anoncis preskaŭ 30 ĝustigojn de la leĝo, sed la registaro agnoskis, ke ili enportas nenion esencan, malgraŭ ke pri la ĝustigproponoj oni konsultia juristojn.

La registaro krome neniel motivigis sian decidon. La menciita ministerio klare anoncas tamen la eblecon allasi kulturadon de modifitaj plantoj post la akrigo de la leĝreguloj. Oni observis ankaŭ plurajn malĝustaĵojn dum la laboroj, kiam ekz. okazas, ke oni voĉdonas ne konante koncernajn tekstojn, ĉar sufiĉas, ke prilaboris ilin la kolegoj de la deputitoj. La komisiono anstataŭ tio volonte malakceptas la proponojn de la kontraŭuloj, subigante ilin al longedaŭraj proceduroj, al kiuj devus esti subigitaj ĉiuj ĝustigoj kaj korektoj.

La registaro substrekas, ke ĝi devas enkonduki tian leĝon, kiu kongruu kun la verdikto de la Eŭropa Tribunalo. Tial oni enkondukas jam nun diversajn principojn ebligantajn la kulturadon de GMO, kio tute ne signifu, ke Pollando konsentas pri GMO sur sia tereno. Oni ne devas esti tamen speciale inteligenta por kompreni, ke tiuspecaj leĝaj formuladoj celas prepari la publikan opinion por la akcepto de GMO en Pollando, kiu ĝis nun estis opiniata liveranto de sana, altkvalita nutraĵo plantdevena kaj bestdevena. Tio tamen plej klare baldaŭ povas ŝanĝiĝi.

La preparlaboroj daŭras, la komisiono kunsidas, sed ĉio ĉi okazas sen televidkameraoj, silente, ja temas pri nenio grava, ĉu ne?

Andreo Bach
Esperanta Retradio

---



## Bildo de la tago

**Malnova urbo *Ĥaranak* en Irano.**

**Vikipedio**

# Morfologio

La intima realaĵo de la vortoj.

Pri la strukturo de la vortoj diras la kompendioj, zorgas la morfologio. Mi persone preferas diri, ke ĝi zorgas pri la animo de la vortoj.



Oni vidu ankaŭ kion diras pri la vorto la evangeliisto: *En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio.* (Johano 1:1)

Tiel grava la vorto estas, ke ĝi akompanis Dion de la komenco de la kreado, estante ĝi mem Dio.

Ankoraŭ laŭ la evangeliisto, pere de la vorto ĉio estiĝis, do devus estiĝi ankaŭ la homara interkompreniĝo, sed bedaŭrinde ni ankoraŭ enloĝiĝas en la Turo de Babelo kaj estas akre trafitaj de la [lat.] *confusio linguarum*, la konfuzo de la lingvoj.

Jam de longe multe da eminentuloj sin dediĉas al profunda studado de diversaspecaj lingvoj, penante malkovri primitivan lingvon, ankaŭ nomatan adama lingvo (lingvo de Adamo), aŭ eĉ krei universalan lingvon, klopodante solvi tiel gravan kaj persistan problemon.

Ramon LLULL, hispana verkisto, poeto, filozofo kaj teologo, dum tridek jaroj kliniĝis super matematikaj, filozofiaj kaj religiaj principoj kaj fine, en 1305, konkludis per *Ars magna* (La granda arto).

Per kombina metodo, *Ars magna* ebligis kombini kaj rilatigi variajn konceptojn kaj sekve esprimi ideojn simplajn aŭ kompleksajn, kaj tiel fariĝis por tiel diri universala scienca lingvo.

Dante ALIGHIERI, itala verkisto, poeto kaj pensisto, inter 1303 kaj 1305 skribis la eseon *De vulgari eloquentia* (Pri nacilingva elokvento). En ĝi, Dante profunde parolas pri la rilato inter gepatraj lingvoj kaj la latina lingvo. Kredante je la universala gramatiko, li ankaŭ parolis pri la serĉado de "eminenta gepatra lingvo".


Guillaume POSTEL, franca astronomo, lingvisto, humanisto kaj teozofo, en 1544 skribis *De orbis terrae concordia* (Pri la tutmonda harmonio).



Ĉi tiu verko estas fundamente religia, tamen POSTEL firme diras, ke la konscienco pri lingvaj problemoj estas esenca por naski mondan harmonion. Li postulas, ke estu komuneco de lingvo kaj asertas, ke la hebrea estis la sankta pralingvo inspirita de Dio al la unua homo.

Gottfried Wilhelm LEIBNIZ, germana matematikisto, sciencisto, filologo kaj filozofo, en 1676 skribis *Universalsprache*, aŭ, latin-lingve, *Characteristica universalis* (Universala lingvo).

Rekte influite de la verkoj de Ramon LLULL, LEIBNIZ ellaboris sistemon de signoj kaj piktogramoj, per kiuj li intencis krei sciencan, matematikan kaj metafizikan universalan lingvon, kvazaŭ "algebron de pensado".



Mi povus citi ankoraŭ multe da aliaj, tamen tiuj kelkaj ekzemploj jam instigas demandojn. Kial tiel gravaj kleruloj ne kapablis proponi al ni efektive taŭgan universalan lingvon? Kiel do povis ZAMENHOF, ankoraŭ knabo, koncepti la kernon de Esperanto? Kiel povis Esperanto supervivi tiujn kaj aliajn lingvajn projektojn? Mi proponas respondon: la morfologio.

ZAMENHOF perceptis, ke, pere de la morfologio, li kapablus atingi ne la surfacon de la vortoj, sed ties intimecon.

Imagu, ekzemple, ke oni volas traduki la portugallingvan vorton "segundo" en Esperanton. Se ĝi estas numeralo, oni diru dua, se ĝi estas substantivo, sekundo; se ĝi estas prepozicio, laŭ.

Kiel oni povas rimarki, la vera signifo de la vorto "segundo" ne estas en la vorto mem, sed en ties kunteksta gramatika kategorio. Pro tio, se mankas morfologia analizo, la vortoj vagadas sencele.

**Ĉu ankaŭ estas tiel en Esperanto? Nepre jes.**

La perfekta aglutina morfologio de Esperanto estas, laŭ mia opinio, la plej grava diferenco inter ĝi kaj aliaj lingvaj projektoj. ZAMENHOF, pere de kelkaj afiksoj kaj kvin vokaloj, finfine sukcesis transiri grandegajn strukturajn barojn.

La adverbo hodiaŭ povas simple fariĝi la adjektivo hodiaŭa aŭ la substantivo hodiaŭo, tiel same kiel la prepozicio apud povas fariĝi la adverbo apude, la adjektivo apuda aŭ eĉ la verbo apudi.

Kvazaŭ origina interlingvistiko, la morfologio sendube permesas nin trairi la suprajôn de la vortoj kaj eniri en universalecan etoson. ZAMENHOF sciis tion, pro tio Esperanto baziĝas sur morfologia grundo, pro tio Esperanto estas vere universala lingvo.

Edson Roberto DE OLIVEIRA
La Lampiro, n-ro 148